Teodoro

E B E R T

# ĉu neperforta revolucio

# aŭ revolucia liberiga milito ?

Esperantigis kaj eldonis la
Pacista Frakcio ɟe S.A.T
en la suplementa serio

ɟe

La Juna Penso - F 47340 Laroque Timbaut

Jun. 1972 - N-ro 84 A

BERGEON J. LUKO

# BERGEON j-L

## esperanto

## nun

Pri paco kaj neperforto haveblas ĉe LJP-broŝur-servo:

- Gandhi kaj satjagraho .. 1 FF
- Por la Paco, kontraŭ la Milito (citaĵoj el famuloj) ..1,20FF
- Ne mortigu! (Tolstoj) ..0,30FF
- Paco en Proksima Oriento ..1,20FF
- Civila Malobeemo (H.D.Thoreau) ..1,20FF
- Maŝinoj, mono kaj mondpaco ..1,50FF

Mendi al:

La Juna Penso
F 47340 Laroque Timbaut
poŝtkonto:
3374 04 M, Bordeaux

La teknika disvolviĝo en la XXa jarcento ŝajne plifortigis unuflanke la potencon de l'regantoj ; la timo pro la revolucia forto kuŝanta en la nura nombro da kapoj kaj manoj hodiaŭ ne plu kapablas devigi la regantojn moderi aŭ forlasi siajn poziciojn. Tekniko donis al ili novajn rimedojn por disvastigi siajn ideologiojn, por kontroli ĉiun "devian" sintenon, kaj por fizike dispremi tiujn, kiuj ankoraŭ havis la iluzion kapabli kontraŭbatali la regantojn per ties propraj armiloj. Tio validas por la komunismaj reĝimoj, por la konservativaj diktaturoj de l'Okcidento kaj por la feŭdaj reĝimoj en la Tria Mondo, sed ankaŭ, laŭ pluraj aspektoj, eĉ por la konstituciaj demokratioj fonditaj sur longa tradicio en la Okcidento, kaj por la pli freŝdataj reĝimoj elvokantaj demokratecon en la evolulandoj.

Fronte al tiu teknika, burokrata kaj ekonomia superregado de la establitoj, du luktometodojn oni konscie disvolvis en la XXa jarcento por publikigi latentajn konfliktojn, kaj por ektransformi la socisistemon : unuflanke la teroristan agitadon, kiu celas la revolucian gerilon, kaj aliflanke la neperfortan agadon, kiu celas neperfortan revolucion.

Ĉiu el ambaŭ metodoj pretendas adekvate respondi la modernajn formojn de superregado. Lin Biaŭ, ministro de l'Ĉinia Defendo, konsideras la batalmetodon per geriloj "spirita atombombo, kiu, en la manoj de l'revolucia popolo, konsistigas multe pli potencan kaj utilan armilon ol estas la fizika atombombo", dum Martin Luther King, Nobel-pacpremiito, esperas ke "la neperforta agado, kiun ekuzis la nigruloj en sia malespera situacio, fariĝos la respondo al la plej urĝa bezono de l'homaro".

La subtenantoj de terorista agitado kaj de gerilo kutime ignoras la eblecojn de l'neperfortaj luktometodoj, pri kiuj Mohandas K. Gandhi, ilia ĉefa reprezentanto en la Tria Mondo, asertis ke "ili povas totale anstataŭi armitan revolucion". La doktrineco de iuj deklaroj de Gandhi kaj iuj strangaĵoj en lia vivmaniero ne kontribuis, por ke oni serioze konsideru la de li subtenatan metodon, la neperfortan agadon. La sektema sinteno, timita de Gandhi, de iuj el liaj disĉiploj, emfazis tiun tendencon, kaj, sur la ekonomia tereno, la paca movado por grunddonaco (Bhoodan) de Vinoba Bhave lasis forgesigi la batalan, eĉ "uzurpan" potencon de l' neperforta agado.

La seniluziiga sperto pri laŭleĝaj kaj pri perfortaj metodoj por ŝanĝi la socion tamen povus estigi novan subtenon kaj revizion al la politika teorio kaj la luktoprocedo de Gandhi, des pli ke la disvolviĝo de lia metodo por solvi la konfliktojn neniam estis totale interrompita, eĉ post lia morto.

Oni jam atentigis pri la kreskantaj malfaciloj, kiujn renkontas la provoj de sociŝanĝigo per leĝaj vojoj, sed ŝajnas ke ankaŭ la metodo per terorista agitado kaj per gerilo ne plenumas siajn promesojn. Ĝi kondukas al rigidiĝo de ambaŭ antagonistoj kaj ĝiajn venkojn pagas la teruraj oferoj de la civilularo - ofte alpremita al la milito.

Signifoplenas, ke la memoro pri la perdoj de la Grekoj dum la rezistado en la dua mondmilito kaj dum la posta revolucia civilmilito retenis ilin ekpreni Maŭ Zedong aŭ sian samlandanon Georgios Grivas-Dighemis kiel profesoron post la ŝtatrenverso far la militistoj en la nokto de 20-21. aprilo 1967. Pli ĝenerale ŝajnas ke, en la landoj malfermitaj al teknika ekspluatado, kaj aparte en la industriaj regionoj, gerilo ne povas disvolviĝi trans la fazo de terorista agitado.

Sed, eĉ en la Tria Mondo, regis kaj ankoraŭ vaste regas skeptiko pri la metodo de gerilo. Ĝis 1964, la kompartioj de Latin-Ameriko kondamnis la armitan lukton de l'partizanoj kiel aventurismon. Certe, okazis ŝanĝiĝo

depost la trikontinenta konferenco en Havano en januaro 1966, sed ankaŭ tie restas ŝanco ekzi neperfortajn luktoprocedojn. Ankaŭ la neperforta revolucio havas siajn modelojn en la Tria Mondo. "Komence, diris Kame N'Krumah en sia aŭtobiografio, mi tute ne povis imagi, ke la filozofio de neperforta rezistado de Gandhi havas ian sukceseblon. Ĝi ŝajnis al mi ege malforta rimedo sen espero pri sukceso. Tiam ŝajnis al mi, ke la solvo de la kolonia problemo troviĝas en la armita ribelado. Sed kiel eblas, mi tiam demandis min, sukcesigi revolucion sen armiloj kaj sen municio ? Studinte dum monatoj la taktikon de Gandhi kaj ekzameninte precize ĝiajn sukcesojn, mi fine komprenis, ke ĝi povos konduki al solvo de la kolonia problemo, proporcie kiel forta politika organizo subtenos ĝin kaj pluigos la strebadon".

N'Krumah estas escepto. Malofte la ribelantoj pripense antaŭelektis luktometodojn. Oni ne ekzamenis la rilatojn inter la uzotaj luktorimedoj kaj la trafotaj celoj. Eĉ kiam la ribelantoj, post grandaj batalo j,kiuj faris multajn viktimojn, atingis sian formalan celon - nacian sendependiĝon, eksproprietigon de l' grandaj bienposedantoj kaj de l'grandaj industriistoj - eĉ tiam multaj konsciis troviĝi ege foraj de la realigo de siaj fundamentaj postuloj pri demokrateco, kaj tio ne nur en la ĉiam supozite mallonga periodo de transiro kaj de plifortiĝo kontraŭ la kontraŭrevolucio.

La belga socialisto Barthélémy de Ligt, volante eltiri instruon el tiu elreviĝo, proponis la formulon : "Ju pli da perforto, des malpli da revolucio". La usona politikologo Mulford Sibley studis tiun hipotezon. En sia kritiko al la Kuba revolucio de Fidel Castro,kritiko kiun oni povas nomi maldekstra kaj kiu tute ne koncernas la celojn de l'revolucio, li konkludas, ke la distingo inter revolucia kaj reakcia perfortoj kuŝas sur iluzio:

"Ĉiu perforto tendencas iĝi 'reakcia', kiuj ajn estas la celoj de la uzantoj. Kvankam oni eble povas iagrade kontraŭstari fine la konsekvencojn de uzado de perforto, tiu ĉi tamen ĉiam postlasas siajn cikatrojn; se realiĝas progresado al egaleca socio, tio estas ĉefe spite al uzado de perforto, kaj ne dank'al ĝi".

Se oni volas bazi sur konvinkaj argumentoj tiun aserton de Sibley, estas preferinde flanklasi histori-filozofiajn nociojn koloritajn de la Orient-Okcidenta konflikto, kiel "reakcia", "faŝista" kaj "totalisma". Sufiĉas pruvi per politikologiaj metodoj,ke la organiz-ita uzado de perforto antaŭsupozigas procezon por el-labori la decidojn, kiu funkcias de supro ĝis malsupro kaj kiu kondukas al likvidado de ĉiu deviista sinteno.

"Les Mains Sales" ("La Malpuraj Manoj") de Jean-Paul Sartre kaj "Viva Zapata" de John Steinbeck modele sur-scenigas la nesolveblajn konfliktojn, en kiujn falas la perfortaj revoluciuloj, kiam ili blinde obeas la de-suprajn ordonojn , aŭ kiam ili devas ekzekuti malnovajn batalkamaradojn nome de l'disciplino. En tiuj kondiĉoj, kiel povas naskiĝi dum revolucia procezo demokrata ŝta-to, pri kiu povas temi nur "se ĝi partoprenigas plej-eble grandan nombron da siaj civitanoj en la ellaborado de l'politikaj decidoj kaj se, laŭ tiu principo, ĝi li-veras al ĉiu civitano la eblecon interveni en tiu decid ellaborado?" . Psikologio povas kompletigi la politikan sciencon en ties kritiko al la revolucia perforto,montr ante ke perfortaj metodoj naskas malamon, timon, suspek ton al la aliaj kaj la neeblecon por ĉiu nuanci sian propran vidpunkton. En tiaj kondiĉoj, normalaj homoj inklinas al "patologia lernado", kaj la "stalinan" sin-tenon de revolucia avangardo oni ne interpretu kiel sim plan personan fiaskon hazardan.

Sibley kaj de Ligt ne faris nur kritikon de la revo lucia perforto. Ili konscias pri la jena fakto : ĉiu-foje kiam mankas aŭ ne sufiĉe larĝas la demokratecaj vojoj por ŝanĝiĝo de l'sociaj rilatoj,se oni nur konsi-las esti pacema kaj rezigni perforton,tio fariĝas ideo-logio objektive je la servo de l'povo.Por ili, kiel por Martin Luther King, la neperforta agado, kiu ŝajnas al ili sintezo de la revolucia ŝanĝ-volo kaj de la demokrat eca respekto al alies opinioj, ebligas eviti tiun dile-mon. "Kiel en la sintezo de la Hegela filozofio,la prin-cipo de neperforta rezistado devas akordigi la kontraŭajn principojn - rezignon kaj perforton - evitante la eks-tremisman kaj malmoralan karakteron propran al ĉiu el

ili. La subtenanto de neperforta rezistado konsentas kun tiu, kiu akceptas sian sorton, pri la jena punkto : oni ne uzu fizikan forton kontraŭ la oponanto - sed , aliflanke li konsentas kun la subtenanto de perforto pri la jena: oni rezistu la malbonon. Li evitas la nereziston de la unua kaj la perfortan reziston de la dua. Kiu rezistas neperforte, tiu devas cedi al neniu ajn maljustaĵo, nek kiel individuo, nek kiel grupo; sed li ankaŭ ne devas uzi perforton por ekregiĝi juston."

Estas laŭ la senco de tiu dialektika interpretado , ke oni prezentos la neperfortan agadon kiel alternativon al la revolucia liberiga milito en la dek sekvantaj tezoj.

°°°

1. Neperforta agado estas lukto-procedo.

Kiam perfortaj revoluciuloj parolas pri "neperforto", ili ĝenerale aludas per tio, aŭ pasivan sintenon,aŭ politikan aktivecon laŭ la normoj trudataj de l'povo.
Efektive, lakampo de "neperforta agado" estas pli vasta; ĝi "povas totale anstataŭi la armitan ribelon", t.e. ke ankaŭ ĝi havigas la eblecon "daŭrigi la politikan disvolviĝon per aliaj rimedoj".

La sinsekvo de neperfortaj luktorimedoj iras de la neperforta protesto, kiu ankoraŭ ne intervenas rekte en la kontestata socisistemo, tra la ne-kooperado, ĝis la civila malobeo kaj ĝis la civila "uzurpado".

2. Neperforta agado antaŭsupozigas neniun apartan formon de kulturo aŭ de konstitucio.

Kontraŭ la neperforta metodo , oni faras la jenan stereotipan obĵeton: oni diras, ke ĝi estas specife hinda aŭ almenaŭ ke ĝi povus valori nur kontraŭ reĝimo atentanta iujn etikajn normojn kaj iujn konstituciajn formojn. Tiun obĵeton refutas la historia sperto.
Gene Sharp, usona sociologo,enketis pri 84 kampanjoj,

en kiuj partio - konstante aŭ iumomente - uzis neperfortajn luktoprocedojn. Li konstatis jenon : 48 kazoj situis en Okcidento (inkluzive Sovetion), 24 en Oriento , 9 en Afriko, 3 estis internaciaj. Proksimume 40 % de la agadoj okazis en demokratecaj landoj, 60 % kontraŭstaris diktaturojn (inkluzive la "totalismajn reĝimojn"). En nur 9 kazoj, el 84, la gvidantoj kaj partoprenantoj de l'agado estis pacistoj.

3. La neperfortajn kampanjojn karakterizas la konfido determinita en neperforta "ultima ratio"(lasta rimedo).

En la neperfortaj revolucioj oni provas komprenigi al la kontraŭantoj, ke la ribeluloj uzas la neperfortajn procedojn ne kiel nuran eksperimenton,sed ke ili subtenos tiujn metodojn ĝis la fino. Tiel,la 12an de oktobro 1930, J. Nehru deklaris en parolado en Allahabad: "La angla vicreĝo de Hindio scias, ke la Kongres-partio decidis post fundaj diskutoj sekvi la neperfortan vojon kaj ke ĝi firme observos ĝin". Per tia decido oni montras al la kontraŭulo, ke li riskas nenion kiel individuo, ke por li estas loko en la postrevolucia sistemo , kaj ke tiu loko estos akceptebla por li.

4.La neperfortaj metodoj atingas sian efekton ne nur per persvado, sed ankaŭ per altrudo.

La revoluciuloj devas havi kiel unuan hipotezon, ke "neniu forlasas siajn privilegiojn sen forta rezisto" . Necesas do kalkuli kun la fakto, ke la regpovo provos perforte subpremi la neperfortajn agadojn.Gandhi esperis ke tiuj akceptitaj suferoj efektos sur la publika opinio kaj la regantaro kiel "drasta terapio". Necesas ke , en la perforta subpremo,la publika opinio kaj la regantoj ekkonsciu pri la kontraŭdiro inter sia ideologio, t.e. la bildo,kiun ili havas pri si mem, kaj sia agmaniero . La originaleco de tiu metodo riveli tion kaŝitan situas en la fakto, ke la akceptita sufero parolas al la inteligento tra la sentimento. "Mi konstatis, asertas Gandhi,

ke la nura alvoko al la racio trovas neniun eĥon ĉie,kie la antaŭjuĝoj estas jarcentaĝaj aŭ apogiĝas sur laŭdira aŭtoritato. La racion devas apogi la sufero, kaj la sufe ro malfermas la okulojn de l'inteligento". Sed eĉ se la "nivelo de nesentemo" estas tre alta ĉe la kontraŭulo , la neperforta agado tamen ankoraŭ ne fiaskos pro tio. Se adekvate partoprenas la amaso, ne-kooperado kaj civila malobeo povas paralizi la kontraŭan superreg-sistemon kaj trudi al la regantaro adaptiĝi al la nova socia situacio. Ankaŭ ne nepre necesas esti konvinkinta la kontraŭ ajn gvidistojn; normale sufiĉas esti iom post iom forlog inta iliajn subtenantojn por devigi ilin cedi aŭ rezigni la regadon.

5. La neperforta agado devas esti ne nur renversa, sed ankaŭ konstruiva.

Ne sufiĉas, ke neperfortaj agadoj malhelpu la funkciadon de la reganta sistemo. La ribelantoj des pli frue devigos sian kontraŭulon forlasi sian konservativan reziston, ke ili montros la ekziston de konstruiva alternativo al la kontraŭata sistemo. Ili penu demonstri plejeble konvinke, ke la de ili proponata soci-sistemo povas funkcii kaj ke la nigraj profetaĵoj de la regantaro estas eraraj. Al la protestado aldoniĝu do "demonstracio pri funkciado". La "teach-in" en la universitatoj estas ekzemplo pri efika kuniĝo de protestado kaj de "demonstracio pri funkciado".

Danilo Dolci kaj liaj kunlaborantoj sciis ligi, en sia "Centro studi e iniziative por la piena occupazione" en Partinico (Sicilio),instigajn projektojn de disvolv iĝo al la protestado kontraŭ la loka "Mafia" kaj la kon servativa registaro de Romo. Tion povas ilustri la ekzemplo pri la malsat-striko de Dolci por la baraĵo de Iato.

En Iato, en okcidenta Sicilio, jam de jaroj oni planis baraĵon, sed la lokaj administracioj, sub la influo de la Mafia ĉiam prokrastis la konstruadon. En septembro 1962, Dolci decidis "dramecigi" la konflikton per dek-

taga malsatstriko en mizera kvartalo de Partinico. Tiu fizika partopreno de Dolci donis al la enloĝantoj konfidon en la ebleco akiri la konstruadon de l'baraĵo spite ĉiujn rezistojn. Stimulite de tiu fastado,sindikatistoj, politikuloj kaj urbdomaj oficistoj kunordigis sian agadon por la baraĵo. La itala gazetaro ekpritraktis la aferon. Oni konsentis la kreditojn kaj definitive fiksis je februaro 1963 la daton por la ekkonstruado.

Certe necesis la malsatstriko de Dolci por sukcesi ; tamen oni ne forgesu, ke necesis ankaŭ prilabori provizoran planadon kaj klarigi al la loĝantaro la celon de la irigaci-instalaĵoj; tio signifas, ke la dektaga malsatstriko por efiki neprigis plurajn jarojn da preparado. Eyviud Hytten, norvega kunlaboranto de Dolci,forte substrekis tiun ĉi punkton: "Ĉiariske trudi la projekton, sen atendi ke ties ideo kreskos 'organece' en la kapoj de l'publiko, tio estus speco de 'bonfara perfortaĵo', kiun kutime plenumas la registaroj. Travagi la regionon kaj malsatstriki ĉie, kie prezentiĝas la okazo de publika protestado, tio estus transformi la entreprenitan agadon en tiun de migranta teatra trupo."

La agado de Danilo Dolci, tiel konstruiva kiel batalema, eventuale povus utili kiel ekzemplo al kelkaj agrikulturaj landoj de Sud-Ameriko, kie ne malofte okazas , ke projektoj abortas ĉar kontraŭataj far iuj influaj konservativaj medioj kaj ĉar la loĝantaro ne kapablas kompreni ilian gravecon.

<u>6. La neperforta agado havas maksimume da sukcesebloj, kiam ĝi ne estas spontana, sed male, antaŭita de funda preparado.</u>

Kompreneble la ribelantoj individue malpli riskas, kiam la neperfortaj agadoj plenumiĝas amasskale. Sed la amas-agadoj faras sian efekton (priskribitan en la kvara tezo) nur kiam disciplinitaj. Nu, amaspartoprenon kaj disciplinon oni povas akiri plejofte nur post zorga preparado. Gandhi akiris siajn sukcesojn, nur kreinte amas-

organizon per zorga laboro por organizi kadrojn de disciplinitaj volontuloj kaj de la Kongres-partio.

La provizoran malsukceson de la neperforta rezistado kontraŭ 'apartheid' (rasapartigo) en Sud-Afriko kaŭzis ĉefe la fakto, ke la Bantuoj kaj la Hindoj ekatakis sen sufiĉa preparo; rezulte, sen vere endanĝerigi la superregadon de la blankula minoritato, ili donis al ĝi la okazon perfektigi sian subprem-aparaton.

7. La vera revolucia luktometodo estas ne la pasiva rezistado, sed la "civila uzurpado".

Ofte oni konsideras - malprave - la neperfortan agadon defensiva kaj pasiva; "la sablero en la radaro" kaj "la blokita maŝino" estas tipaj bildoj de tiu pensmaniero. Tamen ekzistas neperforta metodo, kiun oni povas kvalifiki nur ofensiva kaj aktiva : la civila uzurpado.

En agado por emancipiĝi el la sociordo trudata de la regantaro, la ribelantoj ekprenas la sociajn rolojn respondantajn la de ili deziratan sistemon, kies funkciadon ili antaŭe montris tiel al siaj subtenantoj kiel al ŝiaj kontraŭantoj okaze de "demonstracioj pri funkciado". La "sit-in" de l'usonaj nigruloj en la segregaciaj restoracioj, aŭ la "vojaĝoj de libero" de "integritaj" aŭtobusoj en la sudaj ŝtatoj de Usono estas ekzemploj pri "civilaj uzurpadoj".

La civilaj uzurpadoj devas devigi la regantaron adaptiĝi al la soci-sistemo de l'ribelantoj. Aktuale tio estas la plej subdisvolvita metodo el la arsenalo de neperfortaj agprocedoj. Ĝis nun, civilan uzurpadon oni utiligis ĉefe simbole; tiel, ekzemple, kiam en oktobro 1962 anglaj oponantoj al la atombombo kondukis traktoron ĝis la aviadilejo de Huntington por fosi ties grundon kaj tie fari kultivojn, aŭ kiam en 1930 la Hindoj iris neleĝe ĉerpi salon el la marakvo por rompi la salmonopolon posedatan de la angla kolonia povo.

Sed la civila uzurpado povus fariĝi en Azio kaj en

Sud-Ameriko influa revolucia luktoprocedo, se la kamparanoj - rezignante ĉiun perforton - ĉesus pagi la farmkoston kaj ĝirus siajn impostojn al novaj memmastrumaj organoj aŭ al paralela revolucia registaro.

En la lukto por sendependiĝo de Hindio estas interesaj ekzemploj pri tiu procedo. Oni povus projekti ankaŭ la neperfortan okupadon de l'grandaj bienoj kaj ties dispartigon inter la kamparanoj. Tiu radikala rimedo, la civila uzurpado, estus aparte interesa, kiam jam ekzistas progresemaj leĝoj pri grund-distribuo,kaj ke la obstruc-taktikoj de la grandbienposedantoj malebligas ĝian aplikadon, kiel okazas en Hindio kaj en pluraj ŝtatoj de Sud-Ameriko.

Sur la industria kampo, civila uzurpado povus signifi la uzin-okupadon kaj la kreon de laboristaj konsilantaroj; tiu metodo havas precedencon - kiu ne estas neperforta kaj kiu finiĝis per malsukceso, sed kiu tamen estas instrudona: la uzin-okupadon en Italio,en 1920.

Civila uzurpado postulas kompletan preparadon kaj grandan oferemon, ĉar la regpovo tuj provos forpeli la ribelantojn el la de ili 'uzurpitaj' pozicioj. Tamen , se tiuj uzurpadoj okazis amasskale, la povo efektive ne kapablos kapti ĉiujn ribelantojn, kaj ankaŭ ribeloj en la trupoj povas limigi la agadojn de la soldata sub premo. Tion spertis la Angloj en Peshawar en 1930.

8. <u>La neperforta agado postulas grandan kaj konstantan oferemon. Tamen ĝi kondukas,kun etaj perdoj kaj pli rapide ol perforta agado, al daŭra sukceso.</u>

La lukto por sendependiĝo de Hindio viktimigis ĉ. 8 000 personojn (inkluzive la subpremon far la Angloj al izolaj perfortagoj de Hindoj); la milito por sendependigi Alĝerion viktimigis ĉ. 150 ĝis 200 000 personojn en enloĝantaro entute 30-oble pli etnombra. Tiuj ciferoj pruvas nenion, sed ili instigu al pripensado.

Sed, eĉ se la nombrado de l'viktimoj devas pruvi la

avantaĝon de la neperforta metodo, tamen oni ne forgesu ke la malfacilaĵo, en la neperfortaj kampanjoj, estas ke la engaĝiĝo (partopreno) ĉiam baziĝas ekskluzive sur konscie konsentitaj oferoj, dum , en la geriloj , tiujn oferojn oni akiras per trudo, kaj tio ju pli progresas la lukto. Decidema minoritato tiel povas puŝi tutan landon en militon por liberigo per gerila metodo.

Per neperfortaj metodoj tio ne eblas. Kiam la pagota kosto ŝajnas al ĝi tro alta, la popolo povas ĉiumomente forlasi la batalon. La neperforta revolucio estas pli demokrateca ol la gerilo, laŭ tio ke oni povas nomi gerilon "sanga ĉiutaga plebiscito", nur flank lasante la fakton, ke la gerilano eĉ ne povas eksiĝi el sia trupo, ke la geriloj, kiam ili atingis ian forton, iufoje devigas la popolon subteni ilin sub la minaco de krudaj punoj, kaj ke pli ol unu partizano aliĝis la gerilon nur tial ke la milit-detruoj trudis al li tiun elekton, kaj ke por li ne plu eblas reveno al la "statu quo ante bellum".

Sperto montras, ke la kampanjoj, perfortaj aŭ neperfortaj, povas esti long- aŭ mallongdaŭraj. Sed en la perfortaj revoluciaj liberigaj militoj, fine de la bataloj la militcelon oni povas atingi nur supraĵe. Kiam oni demandis en marto 1963 al Kenneth Kaunda , estonta ĉefministro de Zambio, kial li ne sekvis la ekzemplon de la alĝeria liberiga milito, li deklaris: "Se ni batalus per perforto, kaj post unu du jaroj akirus kion ni volas, ni semus en nia lando la ĝermojn de dubo. Tiuj, kiuj ne akordus kun ni, havus modelon de politika sinteno. Ili provus organizi (novan)revolucion... Plurfoje historio montris, ke la metodo uzita de iu por atingi celon estos la sama metodo,kiun aliaj poste uzos por provi forpreni de li la regpovon. Tio ĉi kondukas al malsekureco en la lando, kio sekve malebligas la kapital-investojn en tiu lando - kaj ĉio ĉi kondukas akumuli la malfacilaĵojn, kaj al nenio alia."

Ĝenerale la subtenantoj de perfortaj revoluciaj objetas pri la neperforta strategio, ke la de ĝi atingitaj ŝanĝiĝoj ne estus radikalaj, kaj ke la ribelantoj

tro frue kontentiĝus per tro etaj rezultoj.Tiu danĝero ekzistas en ĉiu revolucio, kaj ankaŭ J.Nehru konstatis tion en Hindio . Pro la intereso de la formado de la popola konscienco kaj de profunda socia revolucio,ankaŭ li deziris "longan marŝon" : "Ni atendis longan lukton, kun altoj kaj malaltoj kaj haltoj; krome ni volis , ke la popolamasoj progresive kutimiĝu al disciplino , al agadunueco kaj al nia politika koncepto. Ofte , en la unuaj tagoj de la jaro 1932, mi preskaŭ timis rapidan kaj eksteran sukceson , ĉar tio neeviteble rezultigus kompromison , kiu transdonigus la land-gvidadon al la oportunistoj kaj al la registar-fidelulo j... Por ke la lukto vere valoru la penon, necesis ke la popolo fortiĝu en tiu lukto, kaj sufiĉe konsciiĝu pri siaj celoj, por ke ankaŭ ĝi povu eltiri avantaĝon el sukceso de la kampanjo . Se ne , la amasoj luktus kaj sin oferus en psikologie favora momento,sed aliaj tre volonte intervenus kaj konfiskus por si la profiton de la afero. Se ekzistis tiu danĝero , tio estas ĉar en la Kongrespartio mem estis granda malkohereco kaj totala konfuzo pri la reg- kaj soci-sistemo , kiun ni volis starigi. Fakte , kelkaj partianoj ne pensis transformi serioze la reĝimon , sed volis nur anstataŭigi la britan aŭ fremdan elementon per la marko 'Swadeshi'.."(Swadeshi: proks. "made in India").

La sukceso de la movado por sendependiĝo de Hindio ankoraŭ ne signifis la sukceson de la socia revolucio. Tri tagoj antaŭ sia murdiĝo, Gandhi ankoraŭ diris , en Nov-Delhio: "La Kongres-partio akiris per la lukto la politikan liberon,sed ĝi ankoraŭ devas gajni la ekonomian liberon, la socian kaj moralan liberon.Tiuj liberoj estas pli malfacile gajneblaj ol politika libero, ĉefe ĉar ilin oni povas akiri nur per konstruiva laboro, kaj ke la tial necesa lukto estas malpli ekzalta kaj okulfrapa."

Oni taksu nesufiĉaj la provojn de la hinda registaro, senĉese baratajn de la konservativaj fortoj , por starti de supro ĝis malsupro tiun lastan, socialan,revolucion en Hindio. La klopodoj de Vinoba Bhave kaj

de Jayaprakash Narayan por starigi de malsupro ĝis supro tiun socian revolucion per la Bhoodan-movado havis ĝis nun nur limigitajn rezultojn regionajn. Tamen, oni povas iom prave opinii , ke la parta sukceso de la ne perforta kampanjo por sendependiĝo spite ĉion kreis la necesajn politikajn kondiĉojn, por ke la socia revolucio povu okazi, se ne per la parlamentaj vojoj,almenaŭ per dua neperforta ekribelo. Miascie, ankaŭ la hindaj komunistoj ne konsideras la gerilon adekvata rimedo por atingi siajn celojn.

Se ununura lando sukcesus solvi siajn sociajn problemojn per neperfortaj procedoj , probablas , ke ĝi poste povus roli kiel modelo sur la internacia tereno per siaj metodoj, kaj ke, malsame kiel Ĉinio kaj la arabaj landoj, ĝi havus pacigan influon.
Tiu influo necesas en mondo, kiu konas la atomajn detruilojn kaj bezonas la kooperadon inter la Tria Mondo kaj la industriaj landoj, por finsolvi la problemojn de disvolviĝo.

9. Se (spontanaj) revolucioj kelkfoje komenciĝas per neperfortaj agadoj, tiuj ĉi ofte transformiĝas en perfortajn, pro manko de organizaj preparoj kaj nescio pri la neperfortaj luktoprocedoj.

Komence de l'revolucioj, malofte oni trankvile pritaksas la avantaĝojn de ambaŭ eblaj luktometodoj ; mi konas neniun kazon, en kiu, funde pripensinte ambaŭ luktometodojn, oni decidiĝis por la perforta revolucio. Male, ofte okazas, ke, paralele al la unuaj perfortaĵoj de la gerilo, efektiviĝas neperfortaj agadoj de protestado kaj de nekooperado. En tiuj kazoj oni uzas la perfortan subpremon kiel kialon kaj pravigon de la transiro al neperfortaj procedoj aŭ de ties plia daŭrigo. Tiel okazis en Alĝerio, en Ciprio, en Kubo, kaj, komence de la jaroj '60, en Sud-Vjetnamio.

Oni miskonus la agmanieron de la neperforta stra-

tegio, kredante ke ĝi fiaskos , se la kontraŭanto ne ankaŭ estas neperfortulo kaj se li reagas per krudaj punoj. La konstante neperforta sinteno de la ribelantoj devas evidentigi la abismon inter la ideologio kaj la praktiko de la subprema partio. Tiel, unuflanke la subprema partio estas mem "ŝokita" kaj disigita de siaj subtenantoj, kaj aliflanke novaj simpatiantoj aliĝas al la celo de l'ribeluloj (vd. la kvaran tezon). La kreskanta nombro da subtenantoj de la ribeluloj fine devas ebligi, per la nekooperado, la civila malobeado kaj la civila uzurpado, bloki kaj renversi la regantan soci-sistemon.

Se tio montriĝos senefika, la ribeluloj devos fari memkritikon kaj kontroli ĉu, en sia teknika programo, ili sciis konkrete pruvi, ke la de ili aspirata sistemo povas ankaŭ funkcii. Se neperfortaj revoluciuloj povas esti forte suspektataj je anarkismo, kaj se ili ne povas forigi tiun suspekton per sia programo kaj sia disciplinita sinteno, tiam, eĉ kun la plej totala partopreno, ili malsukcesos.

<u>10. Malmultas la eblecoj por direkti perfortan revolucion adopti neperfortajn procedojn. Jam dum la perfortaj bataloj necesus antaŭvidi la uzotan neperfortan strategion por la konfliktaj situacioj aperantaj post la batalfino.</u>

Certe, eĉ en la geriloj, iuj neperfortaj luktoprocedoj povas esti "influa helparmilo en la lukto" ,laŭ generalo Grinas. Sed la "eskalado" de malamo, de perfortaĵoj kaj de ambaŭflanka malkonfido, specifa al la gerilo, ege malfaciliĝas la transiron al ekskluzive neperfortaj luktoprocedoj dum la militdaŭro.

La kontraŭanto ĉiam trovos en la paralelaj aŭ plurestantaj perfortaĵoj tim-kialon kaj pravigon por siaj subpremadoj. Malgraŭ tiuj malfaciloj, oni eventuale povas atingi transiron al neperforta strategio post

batal-paŭzo aŭ komencante sur nivelo regiona kaj limigita al difinita objekto de l'konflikto. Ankaŭ en tiu perspektivo, la kampanjo de l'budaistoj kontraŭ la Diem-reĝimo estas instruplena.

Ĉiukaze, neperfortaj agadoj havas novan sukceseblon post la geril-fino; ĝuste kiam bataloj riskas eksplodi inter la venkintaj revoluciuloj, aŭ kiam ili volas starigi diktaturon. En Alĝerio, kiam fine de aŭgusto 1962 interfrata lukto estis tuj eksplodonta inter la trupoj de la "vilaja 4" (Alĝero) kaj la Ben Bella-subtenantoj, la sindikatoj minacis ekigi ĝeneralan strikon, kaj la popolo, spitante la malpermeson, organizis amasmanifestaciojn, ekstaris antaŭ la tankoj kaj la mitraloj kaj trudis la batalfinon. Tiuj, kiuj postulas la foriron de l'Usonanoj el Vjetnamio, devus jam pripensi la neperfortajn procedojn uzotajn de popolgrupoj,kiujn riskus minaci diktaturo de la revoluciuloj.

Krome, ni ne ekskludu el niaj pripensoj eventualan malvenkon de la perfortaj revoluciuloj kaj necesus studi, ĉu oni ne povus, en dua fazo, akiri pli bonajn rezultojn per neperforta strategio.

## <u>Konkludoj:</u>

Pli fruktodonas disvolvi neperfortan strategion antaŭ ol eksplodigi revoluciajn ribelojn kaj gerilojn, prefere ol protesti kontraŭ la brutalaĵoj de unu aŭ de ambaŭ partioj post la batalkomenco.

La revolucia neperforta tekniko estas malpli disvolvita ol la tekniko de revolucia gerilo. Tamen ankaŭ la neperforta luktometodo havas subtenantojn kaj ekzemplojn en la Tria Mondo. Studi la eblecojn de neperfortaj revolucioj estas grava tasko por la sociologio.

Por komuniki tiun scion pri la neperforta strategio al virtualaj revoluciuloj, necesos personaj kontaktoj. Kiel eblecoj estas ekzemple la rilato kun la studentoj de l'subevoluintaj landoj aŭ la kunlaborado interne de

"Amnestio Internacia" (asocio, kiu luktas por la liberigo de la politikaj malliberigitoj, kiuj nek faris nek instigis fari perfortagojn.)

Se naŭzas nin la teruraj konsekvencoj de la revolucia liberigaj militoj por la koncerna popolo (pri kiu oni ne povas diri, ke ĝi estas libera eĉ en sia decido fari la revolucion), tiam tio plej utila, kion ni povas fari, estas lukti por la neperforta revolucio kaj ekprepari ĝin.

Teodoro EBERT

---=o=---

En la sama serio, alia studinda broŝuro pri neperforta batalo: "Gandhi kaj Satjagraho". (1 FF)
Mendu ĉe: La Juna Penso, F 47 - Laroque-Timbaut,
pĉk: 3374 04 Bordeaux, Francio

## Pri la enhavo de tiu ĉi broŝuro:

La internacia sistemo de minacado kaj timigado, la armad-ekonomio, la malŝparema konsumado kaj aŭtoritataj regad-formoj ekigis tutmondan protestmovadon, kies sociaj kaj demokrataj celoj ofte estas pli evidentaj, ol la vojoj al ili kondukantaj.

Pro tio la miskomprenoj de iuj, flarantaj malantaŭ ĉiu alvoko al ŝanĝo de la sistemo sangan revolucion.

Dume, ĉefe en nia jarcento, okazis granda nombro da sensangaj, neperfortaj revolucioj.

La aŭtoro science esploris ilin kaj poste ellaboris modelojn por neperfortaj, rektaj agadformoj kontraŭ aŭtoritata perforto en la nuna situacio.

Liaj plej gravaj atestantoj estas Gandhi kaj Martin Luther King, kies ekzemploj influis sukcesajn kampanjojn en la tuta mondo.

## Pri la aŭtoro:

Teodoro Ebert estas politika sciencisto precipe pri pac- kaj konfliktesplorado ĉe la Otto-Suhr-Instituto de la Libera Universitato en Berlino.

---

La Pacista Frakcio de S.A.T. stariĝis en la jaro 1947 kaj ellaboris jenan programon:

- studi, malkovri kaj disfamigi la kialojn de milito, esplori la rimedojn kontraŭajn kaj utiligi ilin por kiel eble plej faciligi la kontraŭmilitan taskon en la kadro de S.A.T.
- meti esperanton je la servo de la pacistaj organizoj neesperantistaj por tiel helpi ilin.
- disvastigi esperanton en la pacaj medioj.
- instigi la anojn al agado per ties klerigado.
- se eble, eldoni bultenon.

Kontaktadreso: R. Schneller 3,av.de Rosemont
CH 1208 Ĝenevo , Svisio.

---

Gérant et imprimeur: C. Baudé, F 47 Laroque-Timbaut.
Commission paritaire de presse.............n° 39 863